REU
Estraro de REU
Protokoloj de la Estraraj decidoj (2017–2019)

Protokolo №1 de la Estrara kunveno

DATO: Poŝeĥonjo (Jaroslavla provinco), 06.08.2017
VOĈDONADO: ĉeesta
ĈEESTIS ESTRARANOJ:
Svetlana Smetanina (Moskvo) — Prezidanto, Nikolaj Gudskov (Moskvo) — Vicprezidanto, Miĥail Ĉertilov (Balaŝiĥo), Irina Gonĉarova (Odincovo), Aleksandr Lebedev (Jegorjevsko), Aleksandr Mitin (Niĵnij-Novgorodo), Vladimir Opletajev (Surguto).
TAGORDO / TEMO:
1) Disdivido de taskoj kaj laborkampoj/labordirektoj inter la membroj de la Estraro, elektita de la 29-a Konferenco de REU (Poŝeĥonjo, 06.08.2017–07.08.2017).
2) Diversaĵoj.
DECIDOJ:
1) Komisii al la estraranoj en la dujara ofica periodo 2017–2019 plenumadon de jenaj taskoj kaj labordirektoj:

S. Smetanina — ĝenerala gvidado kaj kunordigado de la agado de la Estraro;
N. Gudskov — ĝenerala gvidado kaj kunordigado de la agado de la Estraro; redaktado de «Bulteno de REU»;
M. Ĉertilov — eksteraj rilatoj;
I. Gonĉarova — regiona agado;
A. Lebedev — financoj, kasisto;
V. Opletajev — instru-metodika agado;
A. Mitin — registrado de membroj, junulara movado.

2) Komisii al Valentin Seguru (Moskvo) daŭrigi la agadon pri la eternigo de la memoro pri Ludoviko Zamenhof kaj oficialigo de Esperanto-objektoj en Rusio.
REZULTOJ DE LA VOĈDONADO:
por: 7;
kontraŭ: 0;
sin detenis: 0.

Prezidanto de REU: S. Smetanina
Vicprezidanto de REU: N. Gudskov
Sekretario de la kunsido: V. Opletajev

Protokolo №2 de la Estrara decido

DATO: Moskvo, 03.09.2017
VOĈDONADO: reta
VOĈDONIS:
S. Smetanina, N. Gudskov, M. Ĉertilov, I. Gonĉarova, A. Lebedev, A. Mitin, V. Opletajev.
TAGORDO / TEMO:
Organizo de AMO-Seminario por rusiaj esperantistoj.
Estas diskutita la decido de la 29-a Konferenco de REU (07.08.2017) pri okazigo de AMO-seminario en Rusio.
DECIDOJ:
1) Proponi al UEA (s-ro Stefan MacGill, vicprezidanto de UEA) organizi en februaro de 2018 en Apudmoskvo AMO-seminarion por rusiaj esperantistoj.
2) Difini la temon de la AMO-seminario: «Junigo kaj modernigo de la Esperanto-movado en Rusio».
3) Komisii al Svetlana Smetanina prepari necesajn aliĝdokumentojn por kandidatigi REU al la AMO-programo kaj ekspedi ilin al UEA.
REZULTOJ DE LA VOĈDONADO:
por: 7;
kontraŭ: 0;
sin detenis: 0.

Prezidanto de REU: S. Smetanina
Vicprezidanto de REU: N. Gudskov

Protokolo №3 de la Estrara decido

DATO: Moskvo, 09.09.2017
VOĈDONADO: reta
VOĈDONIS:
S. Smetanina, N. Gudskov, M. Ĉertilov, I. Gonĉarova, A. Lebedev, A. Mitin, V. Opletajev.
TAGORDO / TEMO:
1) Pridiskuto de la projektoj, proponitaj kaj verkitaj de Aleksandr Lebedev, de Regularo pri la Fonduso «Subteno de laboro pri la vortaro de Boris Kondratjev» kaj de koncerna informa reklama teksto pri la Fonduso.
DECIDOJ:
1) Akcepti la provizoran Regularon de la Fonduso «Subteno de laboro pri la vortaro de Boris Kondratjev» kun posta konfirmo de la Regularo per decido de la sekva REU-Konferenco.
2) Aprobi la reklaman informan tekston pri la Fonduso.
3) Lanĉi la monkolektadon por la Fonduso surbaze de ĝia provizora Regularo.
4) Komisii al Nikolaj Gudskov publikigi la dokumentojn en «Bulteno de REU».
5) Komisii al Aleksandr Lebedev publikigi la dokumentojn en dissendolistoj kaj sociaj retoj.
REZULTOJ DE LA VOĈDONADO:
por: 7;
kontraŭ: 0;
sin detenis: 0.

Prezidanto de REU: S. Smetanina
Vicprezidanto de REU: N. Gudskov

Protokolo №4 de la Estrara decido

DATO: Moskvo, 15.10.2017
VOĈDONADO: reta
VOĈDONIS:
S. Smetanina, N. Gudskov, M. Ĉertilov, I. Gonĉarova, A. Lebedev, A. Mitin, V. Opletajev.
TAGORDO / TEMO:
Nomumo de regionaj kunordigantoj de REU.
Konforme al la artikolo 2 de la Regularo pri la regionaj kunordigantoj de REU, akceptita de la 19-a Konferenco de REU, 2002, laŭ la propono de Irina Gonĉarova, estrarano respondeca pri la regiona agado, estas proponataj ok kandidatoj, kies konsento pri kunlaboro estas ricevita, por esti regionaj kunordigantoj de REU:
- Ildar Kijamov (Kazano) por Volgia regiono;
- Pavel Veselov (Tjumeno) por Urala regiono;
- Vladimir Sapoĵnikov (Krasnojarsko) por Siberia regiono;
- Abduraĥman Junusov (Maĥačkalao) por Nord-Kaŭkazia regiono;
- Aleksandr Lebedev (Jegorjevsko) por Centra regiono;
- Jevgenij Bojĉin (Birobiĝano) por For-Orienta regiono;
- Andrej Rjazancev (Murmansko) por Nord-Okcidenta regiono;
- Irina Gorodeckaja (Novoĉerkassko) por Suda regiono.

DECIDO:
Nomumi la proponitajn kandidatojn
- Ildar Kijamov (Kazano) por Volgia regiono,
- Pavel Veselov (Tjumeno) por Urala regiono,
- Vladimir Sapoĵnikov (Krasnojarsko) por Siberia regiono,
- Abduraĥman Junusov (Maĥačkalao) por Nord-Kaŭkazia regiono,
- Aleksandr Lebedev (Jegorjevsko) por Centra regiono,
- Jevgenij Bojĉin (Birobiĝano) por For-Orienta regiono,
- Andrej Rjazancev (Murmansko) por Nord-Okcidenta regiono;
- Irina Gorodeckaja (Novoĉerkassko) por Suda regiono

regionaj kunordigantoj de REU kun la komenco de oficado ekde oktobro 2017.
REZULTOJ DE LA VOĈDONADO:
por: 7;
kontraŭ: 0;
sin detenis: 0.

Prezidanto de REU: S. Smetanina
Vicprezidanto de REU: N. Gudskov

Protokolo №5 de la Estrara decido

DATO: Moskvo, 25.10.2017
VOĈDONADO: reta
VOĈDONIS:
S. Smetanina, N. Gudskov, M. Ĉertilov, I. Gonĉarova, A. Lebedev, A. Mitin, V. Opletajev.
TAGORDO / TEMO:
Pri la kotizoj de REU-membroj por 2018.
DECIDO:
Konservi la Kotizregularon de REU de la jaro 2017 kaj plilongigi ĝian validecon por la jaro 2018.
REZULTOJ DE LA VOĈDONADO:
por: 7;
kontraŭ: 0;
sin detenis: 0.

Prezidanto de REU: S. Smetanina
Vicprezidanto de REU: N. Gudskov

Protokolo №6 de la Estrara decido

DATO: Moskvo, 25.11.2017
VOĈDONADO: reta
VOĈDONIS:
S. Smetanina, N. Gudskov, M. Ĉertilov, I. Gonĉarova, A. Lebedev, A. Mitin, V. Opletajev.
TAGORDO / TEMO:
Pri la loko kaj dato de Rusiaj Esperanto-Tagoj (RET-2018).
La Estraro diskutis du proponojn por gastigo de RET-2018.
La unuan varianton proponis Svetlana Smetanina: eksa bieno de negocisto Neburĉilov apud la urbo Ŝuja de Ivanova provinco (Centra Rusio).
La duan proponon prezentis Valentina Zaĥarova: sanatorio rande de la urbo Taganrogo ĉe la Azova maro (Suda Rusio).
DECIDO:
1) Elekti por RET-2018 la bazejon de Neburĉilova somerdomo en Ivanova provinco, proponitan de S. Smetanina.

REZULTOJ DE LA VOĈDONADO:
por: 6;
kontraŭ: 1;
sin detenis: 0.

2) Okazigi RET-2018 en la periodo 01.07.2018–08.07.2018.
3) Difini la temon — «Generacia stafeto» kiel la ĉefan temon de RET-2018.

REZULTOJ DE LA VOĈDONADO:
por: 7;
kontraŭ: 0;
sin detenis: 0.

Prezidanto de REU: S. Smetanina
Vicprezidanto de REU: N. Gudskov

Protokolo №7 de la Estrara decido

DATO: Moskvo, 29.11.2017
VOĈDONADO: reta
VOĈDONIS:
S. Smetanina, N. Gudskov, M. Ĉertilov, I. Gonĉarova, A. Lebedev, A. Mitin, V. Opletajev.
TAGORDO / TEMO:
Esperantisto de la jaro 2017.
DECIDO:
Proklami membron de REU s-inon Raja Kudrjavceva (Jekaterinburgo) Esperantisto de la jaro 2017 pro elstaraj meritoj en la multjara kaj sukcesa agado en la Urala regiona kaj tutrusia esperantistaj movadoj.

Prezidanto de REU: S. Smetanina
Vicprezidanto de REU: N. Gudskov

Protokolo №8 de la Estrara decido

DATO: Moskvo, 05.12.2017
VOĈDONADO: reta
VOĈDONIS:
S. Smetanina, N. Gudskov, M. Ĉertilov, I. Gonĉarova, A. Lebedev, A. Mitin, V. Opletajev.
TAGORDO / TEMO:
Pri la nomumo de REU-komisiito pri kontaktoj kun Komisiono pri Azia-Oceania Esperanto-Movado (KAOEM).
DECIDO:
1) Elekti membron de REU Vasilij Masjagin el Omsko (kandidatigo de M. Ĉertilov) kiel REU-komisiiton pri kontaktoj kun Komisiono pri Azia-Oceania Esperanto-Movado (KAOEM).
2) Konforme al la artikolo 3.11 de la Statuto de REU konfirmi la elektitan komisiiton per decido de la sekva 30-a Konferenco de REU.
3) Rajtigi V. Masjagin ekplenumi la funkciojn de la komisiito ekde decembro 2017.
4) Taski V. Masjagin observi la aferojn de KAOEM kaj informi la Estraron pri gravaj eventoj, en kiuj REU povus partopreni.
6) Devigi la komisiiton regule raporti al la Estraro pri kontaktoj kun la sekretariaro kaj funkciuloj de KAOEM.
REZULTOJ DE LA VOĈDONADO:
por: 7;
kontraŭ: 0;
sin detenis: 0.

Prezidanto de REU: S. Smetanina
Vicprezidanto de REU: N. Gudskov

Protokolo №9 de la Estrara decido

DATO: Moskvo, 14.12.2017
VOĈDONADO: reta
VOĈDONIS:
S. Smetanina, N. Gudskov, M. Ĉertilov, I. Gonĉarova, A. Lebedev, A. Mitin, V. Opletajev.
TAGORDO / TEMO:
Pri la Komisiono pri eksteraj rilatoj de REU.
DECIDO:
1) Akcepti la prezentitan de M. Ĉertilov provizoran Regularon pri la Komisiono pri eksteraj rilatoj de REU, fonditan de la 28-a Konferenco de REU (Paragrafo 4 de la Decidoj de la Konfereco, 19.07.2015), kun posta konfirmo de la Regularo per decido de la sekva REU-Konferenco.
2) Aprobi la nunan laborgrupon de la Komisiono pri eksteraj rilatoj de REU en la konsisto:
M. Ĉertilov (Balaŝiĥo), V. Seguru (Mitiŝĉi), Je. Zajdman (Jalto), I. Kossey (Germanio) kun definitiva konfirmo de la komisionanoj per decido de la sekva REU-Konferenco.
3) Komisii al M. Ĉertilov gvidi la Komisionon pri eksteraj rilatoj de REU ĝis la sekva Konferenco de REU.
REZULTOJ DE LA VOĈDONADO:
por: 6;
kontraŭ: 0 ;
sin detenis: 1.

Prezidanto de REU: S. Smetanina
Vicprezidanto de REU: N. Gudskov

Protokolo №10 de la Estrara decido

DATO: Moskvo, 18.01.2018
VOĈDONADO: reta
VOĈDONIS:
S. Smetanina, N. Gudskov, M. Ĉertilov, I. Gonĉarova, A. Lebedev, A. Mitin, V. Opletajev.
TAGORDO / TEMO:
Peto de Aleksandr Derjugin pri malaniĝo de la membroj de REU.
DECIDO:
1) Konforme al la artikolo 2.7 de la Statuto de REU kontentigi la peton de sinjoro Aleksandr Derjugin (Saratovo) pri memvola malaniĝo kaj eksigi lin el la dumvivaj membroj de REU ekde 18.01.2018.
2) Enkasigi 467 rublojn de la individua REU-konto de s-ro Derjugin kiel lian libervolan donacon al REU.
REZULTOJ DE LA VOĈDONADO:
por: 7;
kontraŭ: 0;
sin detenis: 0.

Prezidanto de REU: S. Smetanina
Vicprezidanto de REU: N. Gudskov

Protokolo №11 de la Estrara decido

DATO: Moskvo, 09.02.2018
VOĈDONADO: reta
VOĈDONIS:
S. Smetanina, N. Gudskov, M. Ĉertilov, I. Gonĉarova, A. Lebedev, A. Mitin, V. Opletajev.
TAGORDO / TEMO:
Pri la partopreno de REU en la tutrusia civitana socia aktivaĵo «La lasta adreso» kaj omaĝo al pafmortigitaj sovetiaj esperantistoj en la jaroj de la reprezalioj de la reĝimo de Stalin.
DECIDO:
1) Aprobi la iniciaton de N. Gudskov pri kontaktoj kun aktivuloj de la projekto «La lasta adreso» kaj partoprenigo de moskvaj esperantistoj la 28-an de januaro 2018 en la inaŭguro de la memoriga tabulo pri la pafekzekutita esperantisto Nikolaj Incertov (1896–1937).
2) Konsideri la partoprenon de membroj kaj asociitaj kolektivoj de REU en la tutrusia projekto «La lasta adreso» unu el gravaj aktualaj aktivaĵoj kaj agadoj.
3) Komisii al N. Gudskov kunordigi la agadon de rusiaj esperantistoj pri trovado kaj identigo de nomoj de reprezaliitaj esperantistoj kaj periode informi pri ĝi en «Bulteno de REU».
4) Komisii al N. Gudskov verki koncizan rekomendaron pri necesaj dokumentoj kaj konkretaj paŝoj al kunlaboro kun la neregistara organizaĵo «La lasta adreso» por eventuala instalo de memorigaj tabuloj pri pafmortigitaj esperantistoj.
5) Rekomendi al la regionaj REU-kunordigantoj kaj lokaj reprezentantoj de REU iniciati esplorserĉadon de reprezaliitaj esperantistoj en regionoj kaj urboj de RF por posta surmurigo de memorigaj nomtabuloj pri ili kunlabore kun la neregistara organizaĵo «La lasta adreso».
6) Rekomendi al la regionaj REU-kunordigantoj, lokaj reprezentantoj de REU, klubaj aktivuloj verki kaj publikigi en «Bulteno de REU» materialojn pri esperantistoj, diversgrade reprezaliitaj dum la jaroj de la Granda teroro (1937–1938).
REZULTOJ DE LA VOĈDONADO:
por: 6;
kontraŭ: 1;
sin detenis: 0.

Prezidanto de REU: S. Smetanina
Vicprezidanto de REU: N. Gudskov

Protokolo №12 de la Estrara decido

DATO: Moskvo, 01.03.2018
VOĈDONADO: reta
VOĈDONIS:
S. Smetanina, N. Gudskov, I. Gonĉarova, A. Lebedev, A. Mitin, V. Opletajev.
TAGORDO / TEMO:
Pri la Regularo por informartikola konkurso.
DECIDO:
1) Aprobi la Regularon pri la konkurso pri informa artikolo.
2) Publikigi la Regularon en «Bulteno de REU» kaj okazigi la konkurson pri informa artikolo en marto–junio 2018 inter rusiaj esperantistoj.
3) Dum RET-2018 proklami la rezultojn de la konkurso, transdoni diplomojn kaj librodonacojn al gajnintoj de la konkurso.
REZULTOJ DE LA VOĈDONADO:
por: 6;
kontraŭ: 0;
sin detenis: 0.

Prezidanto de REU: S. Smetanina
Vicprezidanto de REU: N. Gudskov

Protokolo №13 de la Estrara decido

DATO: Moskvo, 14.06.2018
VOĈDONADO: reta
VOĈDONIS:
S. Smetanina, N. Gudskov, A. Lebedev, A. Mitin, V. Opletajev.
TAGORDO / TEMO:
Pri proklamo de «Eminenta Esperanto-instruisto de Rusio en la lernojaro 2017–2018».
DECIDO:
Konsiderante
grandajn meritojn en la instru-metodika laboro dum la pasinta lernojaro
kaj imitindajn sukcesojn en la gvidado de diversnivelaj Esperanto-kursoj, apogado kaj lertigo de kursfinintoj prepare al KER-ekzameno, diskonigado de propraj instruistaj spertoj,
proklami sinjorinon Irina Gonĉarova
«Eminenta Esperanto-instruisto de Rusio en la lernojaro 2017–2018».
REZULTOJ DE LA VOĈDONADO:
por: 5;
kontraŭ: 0;
sin detenis: 0.

Prezidanto de REU: S. Smetanina
Vicprezidanto de REU: N. Gudskov

Protokolo №14 de la Estrara decido

DATO: Moskvo, 20.11.2018
VOĈDONADO: reta
VOĈDONIS:
S. Smetanina, N. Gudskov, I. Gonĉarova, A. Lebedev, A. Mitin, V. Opletajev.
TAGORDO / TEMO:
Pri la Regularo «Eminenta rusia instruisto de Esperanto (de la lernojaro...)».
DECIDO:
Akcepti la prezentitan de V. Opletajev projekton de la Regularo «Eminenta rusia instruisto de Esperanto (de la lernojaro...)», kun posta konfirmo de la Regularo per decido de la sekva REU-Konferenco.
REZULTOJ DE LA VOĈDONADO:
por: 6;
kontraŭ: 0;
sin detenis: 0.

Prezidanto de REU: S. Smetanina
Vicprezidanto de REU: N. Gudskov

Protokolo №15 de la Estrara decido

DATO: Moskvo, 25.11.2018
VOĈDONADO: reta
VOĈDONIS:
S. Smetanina, N. Gudskov, I. Gonĉarova, A. Mitin, V. Opletajev.
TAGORDO / TEMO:
Pri «Decembra poezia marŝo de esperantistoj» — propono de Raja Kudrjavceva (Jekaterinburgo).
DECIDO:
1) Aprobi la iniciaton de R. Kudrjavceva (Jekaterinburgo) pri organizo de tutlanda aktivaĵo «Decembra poezia marŝo de esperantistoj», dediĉita al la 129-a naskiĝdatreveno de Ludoviko Zamenhof.
2) Komisii al R. Kudrjavceva kaj I. Gonĉarova, estrarano de REU, respondeca pri la regiona agado, gvidi la projekton (t. e. informi pri la aktivaĵo kaj aktivigi kolektivojn kaj apartajn esperantistojn en regionoj kaj urboj de Rusio, kolekti informojn pri ĝi, prezenti rezultojn).
3) Komisii al A. Mitin, estrarano de REU, helpi la gvidantojn de la kampanjo pri publikigo de tekstaj kaj videaj materialoj en la retejoj de REU (paĝaro http://reu.ru, grupo «REU» en «VKontakte»).
4) Okazigi la tutan programon en la periodo de la 10-a ĝis la 25-a de decembro 2018.
REZULTOJ DE LA VOĈDONADO:
por: 5;
kontraŭ: 0;
sin detenis: 1.

Prezidanto de REU: S. Smetanina
Vicprezidanto de REU: N. Gudskov

Protokolo №16 de la Estrara decido

DATO: Moskvo, 01.12.2018
VOĈDONADO: reta
VOĈDONIS:
S. Smetanina, N. Gudskov, I. Gonĉarova, A. Lebedev, A. Mitin, V. Opletajev.
TAGORDO / TEMO:
Pri Esperantisto de la jaro 2018 laŭ la versio de REU.
DECIDO:
Proklami membron de REU s-on Vladimir Sapoĵnikov (Krasnojarsko) Esperantisto de la jaro 2018 pro la grava kaj sukcesa agado sur la posteno de regiona kunordiganto de REU en Siberia regiono kaj pro la aktiva partopreno en la tutrusia esperantista movado.
REZULTOJ DE LA VOĈDONADO:
por: 6;
kontraŭ: 0;
sin detenis: 0.

Prezidanto de REU: S. Smetanina
Vicprezidanto de REU: N. Gudskov

Protokolo №17 de la Estrara decido

DATO: Moskvo, 07.02.2019
VOĈDONADO: reta
VOĈDONIS:
S. Smetanina, N. Gudskov, I. Gonĉarova, A. Lebedev, A. Mitin, V. Opletajev.
TAGORDO / TEMO:
Pri la membreco kaj kotizoj en REU.
DECIDO:
Akcepti la Regularon «Membreco kaj kotizoj en REU» (Propono de A. Lebedev) inkluzive de la kotiztabelo de REU por la agadjaro 2019.
REZULTOJ DE LA VOĈDONADO:
por: 6;
kontraŭ: 0;
sin detenis: 0.

Prezidanto de REU: S. Smetanina
Vicprezidanto de REU: N. Gudskov

Protokolo №18 de la Estrara decido

DATO: Moskvo, 14.03.2019
VOĈDONADO: reta
VOĈDONIS:
S. Smetanina, N. Gudskov, I. Gonĉarova, A. Lebedev, A. Mitin, V. Opletajev.
TAGORDO / TEMO:
Pri la Regularo de la reta grupo de REU en la socia reto VKontakte.
DECIDO:
1) Akcepti la Regularon de la grupo de REU en la socia reto VKontakte (propono de A. Mitin).
2) Komisii al Aleksandr Mitin esti ĉefadministranto de la reta grupo de REU en 2019.
REZULTOJ DE LA VOĈDONADO:
por: 6;
kontraŭ: 0;
sin detenis: 0.

Prezidanto de REU: S. Smetanina
Vicprezidanto de REU: N. Gudskov

Protokolo №19 de la Estrara decido

DATO: Moskvo, 22.04.2019
VOĈDONADO: reta
VOĈDONIS:
S. Smetanina, N. Gudskov, I. Gonĉarova, A. Lebedev, A. Mitin, V. Opletajev.
TAGORDO / TEMO:
Pri la kunvoko kaj organizo de la 30-a Konferenco de Rusia Esperantista Unio.
DECIDO:
1. Konforme al la artikolo 3.4. de la Statuto de Rusia Esperantista Unio kaj la artikolo 3.1. de la Ĝenerala Regularo de Rusia Esperantista Unio kunvoki la 30-an Konferencon de REU la 17-an – 18-an de julio 2019.
2. Okazigi la 30-an Konferencon de REU kadre de «Tiĥvinaj Esperanto-Metiejoj — 2019» en turista sporta bazejo apud Carina lago de la urbo Tiĥvino (Leningrada provinco), t. e. partoprenontoj de la Konferenco devas oficiale aliĝi al TEMoj. http://temoj2019.online/
3. Komisii al la Prezidanto de REU S. Smetanina kunordigi kaj gvidi la Organizan grupon de la Konferenco kaj preparadon de la Konfrenco en aprilo–julio 2019.
4. Koopti en la Organizan grupon de la Konferenco la membrojn de la nuna Estraro de REU: S. Smetanina (Moskvo), N. Gudskov (Moskvo), I. Gonĉarova (Odincovo), A. Lebedev (Dolgoprudnij), A. Mitin (Niĵnij-Novgorodo), V. Opletajev (Surguto); la membrojn de la nuna Kontrol-Revizia Komisiono de REU: G. Basov, kunordiganto de KRK (Tomsko), A. Milner (Moskvo), V. Seguru (Mitiŝĉi).
5. Operative prezenti al la membroj de REU pere de «Bulteno de REU», reta grupo de REU en «VKonakte» kaj dissendolisto «REU-AGADO» preparplanon kaj projekton de la Tagordo de la Konferenco (majo 2019).
REZULTOJ DE LA VOĈDONADO:
por: 6; kontraŭ: 0; sin detenis: 0.

Prezidanto de REU: S. Smetanina
Vicprezidanto de REU: N. Gudskov